

Heinrich Heine,
Libro de la kantoj, Junaĝaj suferoj, Romancoj VI

tradukita de Manfred Retzlaff

Marŝadas hejmen al la patri',
Estintaj kaptitoj militaj,
Du grenadistoj tra Germani'
Kaj ekestis tre afliktitaj.

Kaj kredi ĝin ili volis ne,
Ke estis Francujo perdita,
Kaj estis venkita la granda arme' -
Kaj la imperiestro kaptita.

Ekploris ambaŭ jen kune tre,
Por tiu novaĵo tristiga.
Kaj diris la unu: Ho, kia ve'!
"Aĥ, estas ĝi doloriga!"

"Mi volus morti ja kun vi,
Perdiĝis la afero.
Sed hejme mia famili'
Atendas en mizero."

Sed tion ne interesas min,
Mi havas alian deziron.
Almozojn petegu infan' kaj virin',
Ni liberigu la Siron.

...

Permesu, ho frat', ke vin petu mi:
Se mi nun mortos ie,
Kunportu min hejmen al la patri'
Kaj enterigu min tie.

La krucon de l' honoro vi
Kun la pafil' aldonu,
Surkore metu ĝin, al mi
La spadon vi alzonu.

Entombe hejme en Franci'
Mi kuŝos, ĝis aŭdos trotadon
De la ĉevaloj henantaj mi
Kaj de la kanonoj tondradon.

Jen rajdos la Siro kun nia arme'.
Mi havas nur unu deziron.
Entombe plu restos mi tiam ne,
Ekstaros mi ŝirmi la Siron.

*Traduko de la Germana poemo "Buch der Lieder, Junge Leiden, Romanzen VI" de HEINRICH HEINE (*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04).*

Arg-713-1433 (2012-12-09 09:52:25)